

Fondaĵo Premioj Por Ĝustaj Vivrimedoj

Right Livelihood Award Foundation

Porgazetara informo je la 4-a de oktobro 1995

La premio pri 250000 USD de la Fondaĵo "Por Ĝustaj Vivrimedoj" de la jaro 1995 estas distribuita inter jenaj institucioj kaj personoj, kiuj engaĝiĝis en la lukto por humanaj rajtoj kaj etna maldiskriminacio:

La Serba Civila Konsilio de Bosnio-Hercegovino,
András Biró kaj la Hungaria Fondaĵo por Memkonscio,
Sulak Sivaraksa de la Tajlanda Indiĝena Movado,
Carmel Budiardjo de la Indonezia Homrajta Organizo.

1. La **Serb Civic Council (SCC)** strikte rifuzis cedi kaj submeti sin al iaj etnaj diskriminacioj. La ĵurio honoras "la forgesitan voĉon de ĉiuj bosnaj serboj, kiuj konsekvence rifuzis, sub malfacilegaj kondiĉoj, la genocidan militadon de la reĝimo en *Pale*" kaj persistis je la daurigo de humana, multetna kaj demokrata Bosnio-Hercegovino, ankaŭ sub murdminacoj kaj en danĝero de embuskaj pafistoj.

Lau opinio de brita historiisto A. Hastings la SCC elstare kontribuas al la homrajta movado kaj pruvas, ke en Bosnio-Hercegovino ne temas pri civila milito inter muslimoj kaj serboj, kiel prefere sed erare disvastigite, sed pri lukto inter legitima demokrata administrado kaj faŝist-terorista kontraŭmovadoj.

SCC estis fondata en marto 1944 kaj nombras nun ĉirkau 50000 membrojn, kiuj celas la pluekzistadon de la multkultura bosna socio.

Konataj membroj de SCC estas inter aliaj Mirko Pejanovic, Ljubo Berberovic kaj la ĵurnalisto Rajko Zivkovic de la konata ĵurnalo *Oslobodjenje* en Sarajevo.

2. **András Biró kaj la Hungarian Foundation for Self-Reliance (HFSR)** estas firmanimaj defendantoj kaj subtenantoj de la hungara roma (cigana) minoritato kaj celas ties memkonscio per evoluo kaj subteno al memhelpo. Li fondis en 1990 la HFSR (*Autonomia Alapítvány*), kiu rangas kiel NGO (ne-registrara organizo); ĝia specifa iniciato estas t.n. Toleremo Premio por tiu hungara informa medio, kiu plej efike kontribuas al etna harmonio.

A. Biro estas fondinto de la FAO-magazeno "Ceres" kaj kunlaboranto kun UN kaj meksikaj NGO-j.

3. **Sulak Sivaraksu** estis lektoro de la universitatoj Thammasat kaj Chulalongkorn, fondis kaj eldonis la *Social Sciences Review*. Nun li laboras por indiĝenaj NGO-j en Tajlando.

Ĉefa temo estas la refuso de la okcidenta konsumisma evoluumodelo favore al la indiĝena taj-kulturo. Al tiu celo Sulak iniciatis internacian organizan reton "Alternativoj al Konsumismo" kontraŭ la mondvastaj konsummanieroj kaj li ekvivigis la *Spirit in Education Movement (SEM)* "Spirita Eduka Movado", kiu ofertas spirite bazitan *holistikan* alternativon kontraŭ la hodiaŭaj, de la spirito de la tempo influitaj edukaj metodoj.

4. **Carmel Budiardjo**, brita civitano, kunfondis en 1973 la indonezan homrajtan kampanjon TAPOL (indoneze "politika arestito"), kiu kontraŭas en 1995 antaŭ ĉio la 20-jaran datrevenon de la invasio kaj perforta subpremado de Orient-Timor kaj Okcident-Papua-io far de la indoneza militar-reĝimo. Kune kun IFET en Japanio TAPOL laboras kontraŭ la eksporto de armiloj enkadre de la t.n. evolua helpo al Indonezio, kiu fakte

devas esti taksita kiel subteno al malkonstruktiveco en la manoj de maldemokratiaj diktatoroj.

(Postrimarko:

En tiu konekso ni memoras al la kontribuo en SR (1994)(2) p. 42 pri la honorigo de **Ken Saro-Wiwa / MOSOP** (*Movement for the Survival of the Ogoni-People*), Niĝerio, per RLA. Kiel la mondo devis ekscii li ne plu vivas: terorista registrara kliko kondamnis lin en ŝajnproceso kaj murdis lin kune kun aliaj ogolandanoj. Reganta diktaturo en la Tria Mondo plenumis tiel, nome la reganta klaso en la Unua Mondo, la profitavidajn interesojn de la transnaciaj oleo-entreprenejoj *Shell, Elf-Aquitaine, Agip, Exxon, Mobil* k.a.

Sed difektitaj estas ni ĉiuj, kiuj ankau ni profitas el la ekspluatado de la Tria Mondo kaj de la Tero entute.). (rh)

La premioj *Right Livelihood Awards*, ankau nomitaj "Alternativaj Premioj Nobel", estas transdonitaj kiel kutime en la Sveda Parlamento antaŭ la Tago de la Homrajtoj kaj antaŭ la transdono de la Premioj Nobel. Tiuj ĉi premioj enkondukiĝis en 1980 "por honoro kaj subteni tiujn, kiuj montras praktikajn kaj ekzemplajn respondojn al la plej urĝaj defioj, kiuj frontas nin en la hodiaŭ mondo". La ideo venis de Jakob von Uexkull, sveda-germana filantropo; li opiniis, ke la Premioj Nobel fariĝis tro limigitaj kaj specialigitaj kaj ignoras multan laboran kaj esencan scion, kiu estas vivnecesa por la pluvivado de la homaro.

Pri pliaj detaloj komuniku kun:

Right Livelihood Awards Administrative Office
S-ino Kerstin Bennett - Administra Direktorino RLA
P.O.Box 15072
S-10465 Stockholm
Tel. +46-(0)8-7020340
Fax. +46-(0)8-7020338

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Tutmondaj Scienco kaj Tekniko

1995

2

(40)

Ĉefadministrata
de Ĉina Akademio de Sciencoj
Aŭspiciata de Sciencista-Teknikista
Esperanto-Asocio de ĈAS
Eldonata de Eldonejo Tutmondaj
Scienco kaj Tekniko
Ĉefredaktoro kaj direktoro de el-
donejo TSKT: Shen Chengru
Presita de: Jingmei Kolorpresa
Kompanio
Eldonita de 10 Junio 1995
Prezo: USD 16 jare por 4 numeroj
(inkluzive de aerpoŝta sendokosto)
Korespondada adreso: Esperanto-
Asocio, Academia Sinica, 52
Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio
Reklamo-licenco: Jingxigongshang
guangzi n-ro 0398
N-ro de revuo: ISSN 1003-1898
CN 11-1733/N

ENHAVO

• ANTAŬAESPRIMO •	
Kreu Maturan Estontecon	Qiangnian(3)
• ZHONG NAN HAI •	
Dek Ekonomikaj Tezoj de Deng Xiaoping	(5)
• EL ĈAS •	
Evoluas struktura reguligado de Ĉina Akademio de Sciencoj (Shen Hua)	(8)
• SCIENC-TEKNIKA MOVIĜADO •	
Monda Kongreso de Scienc-Teknikaj Industriaĵoj Okazos en Pekino (Wu Jisong)	(11)
•SPECIALA INTERVJUO•	
Scienco kaj Tekniko estas la Unua Produkta Forto	(15)
Tutmondaj Scienco kaj Tekniko dekjarigis en oktobro ĉijare	(17)
Tutvive serĉi sciencan lumen—pri Yan Jici	(20)
Elstara Ĉina Virino—pri Mao Jianqin	(22)
Natura katastrofo kaj Astronomia Fenomeno (Sun Kexun)	(28)
•DISERTAĴOJ DE LA 4-A IAKSTE•	
nova koncepto pri spaco-tempo kvantuma konduto de partikloj (P. K. Smrz, Aŭstralio)	(31)
Diferenco de la nuntempa ekologio (H. Marinov, Bulgario)	(35)
Eta resumo de natur-kuracmetodo laŭ Sac. S. KNEIPP(Rudolf Skoruppa, Germanio)	(41)
•KRESTOMATIO•	
Pri Papametroj de Neŭtrono/Kondolenco	(45)
•FAMA STELO DE SCIENC-TEKNIKO•	
Wendun Seiff—Patro de Interreto/Starti de telefonnumera libro	(47,48)
•VOĈO DE ESPERANTO•	
Profunde disvolviĝu scienc-teknika Esperanto-movado (Shen Chengru kaj Wang Yuchun)	(50)
La Kunvoko de La 4-a IAKSTE Vekis Varman Eĥon tra la Mondo	(53)
Kvarlingva Jura Vortaro	(55)
•MEDICINO K SANPROTEKTADO•	
Provu Jenajn Simplajn Sanigajn Rimedojn	(56)
Nova Furoro en Ĉinio: Aĉeti Sanon (Xin Wen)	(57)
•INFORMO PRI KUNLABORO•	
EĈC serĉas kunlaboranton	(58)
•TERMINARO•	
Laŭtema Vortaro Esp-Angla-Ĉina	(58)